

# R. TOBELLA

Eldonisto de CLAU ESPERANTO kaj POŝVORTARETO

18, Carme, 18 - Barcelona  
ESPERANTA PRESEJO

## TUTMONDA ESPERO

Organo de la kataluna esperantistaro

Aperas nur en esperanta lingvo; literaturo, enlanda kaj eksterlanda movado, rakontoj, amuzaj por instruata praktiko k. t. p.

ĈARA ANONCO { Ekster Hispanujo. 4 frankoj (1'60 sm.)  
En Hispanujo . . . 3 » (1'20 » )  
ĈIU NUMERO . . . . . 40 cimoj. (0'15 sd.)  
Por abonantoj kaj kunlaborantoj 25 » (0'10 » )

Specimeno (nenomita numero) estas ricevebla po sia valoro.

Ĉiuj mendoj devas esti akompanataj de mono.

Ĉiuj monosendoj estu farataj per germanaj, francaj aŭ hispanaj postmarkoj; per francaj, rusaj aŭ hispanaj papercimoj; per internaciaj respondkuponoj da 10. sd. kaj per ĉekoj aŭ transpagiloj de la Ĉekbanko Esperantista.

Oni bonvolte skribi legeble sur respondpostkarto, aŭ aldoni respondkuponojn al la loto, se oni postulas respondojn. Ĉiu nova abonanto ricevos senpage la eksterlandan numeron de la V.ª Kongreso, samtempe ke li havos la rajton akiri la kolektojn de la jaroj 1909, 1909 kaj 1910 por la duono de sia valoro, t. e. po 1'50 fr. (sm. 0'30) ĉiu kaj, kiel la ceteraj abonantoj, povos mendu, por unu fojo dum la tuta jaro, trilionan anoncon.

### ABONEJOJ

Francaĵo: Librojo de Esperanto,  
15, rue Montmartre - Paris  
Katalunaĵo:  
S-roj Suñer kaj K.ª, Presejo - S. Pella Guixols.  
S-ro Rosals - Portaforriça, 30, Barcelona  
S-ro J. Palmerola, P. Major - Vic.  
S-ro J. Quintana, Cases Noves - Palafrugell.


### TARIFA POR ANONCOJ

Tuta paĝo. . . 12 frankoj (1'80 sm.)  
Duono da paĝo 7 » (1'10 » )  
Kvarono . . . 3'50 » (1'40 » )  
Okono . . . . 2 » (80 sd)

Anoncoj por peti korespondon kostas 30 cimoj (4 sd.) ĉiu linio.

### REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Tallers, 81 - Barcelona  
Pri administraciaj aferoj sin turni al S-ro B. Anglada



## LAMPARA C.

de filament metalic

Reunicez totas les ventatges de la millor estrangera

Dura 2000 hores i es la més resistent

i un 40 % mes barata

Preu unic, de 16 a 75 bugies, 2 PESSETES

Deposit i venda a BARCELONA:

Rambla de les Flors, 16, entlo

Oni parolas kaj korespondas komerce per Esperanto

## ★ ★ Esperanta ★ ★ Biblioteko Internacia

Tiu-ĉi biblioteko enhavas facilajn legajojn de ĉiulandaj omnicutaj esperantistoj. Ĝi tial bonege taŭgas per ekzercado de la lingvo ĉu dum la grupaj kunvenoj ĉu per privata legado.

Prezo po kajero 0,19 Sm (0,39 M.)  
Serio de 12 volumoj (afraankite) 1,25 Sm (2,50 M.)  
Ĉiu libroto enhavas 40 - 50 paĝojn.

### Esperanto Verlag Möller & Borel

Berlin S. W. Linden - Strasse 18 - 19.  
Por Hispanujo: Joan Rosals, Barcelona, strato Portaforriça, 30



### Kazar Esperantista

Specialoco en la mezuro de ĉamizoj por viroj. Konfektejoj por unjorinoj kaj ĝinfanoj, kravatoj, poŝtukoj, gantoj, parfumo, trikotaje kaj aliaj artikoloj.

Tratador, 2-Jaqueiras, 18  
BRASILEIRO

# TUTMONDA ESPERO



Barcelona, Junio-Julio 1911

40 cent.

# MISTERA KRIMO

Amuzza unuanta komedio. 1 fr. (0'400 sm.)

# Unu fojon...!

Humoraĵaro laŭga por la Esperanta lernado. 0,30 fr. (0'120 sm.)

Mendebaj ĉe MIKNELO CASES, Strato Salmerón, 229, 4.º - Barcelona (España)

## REKLAMOJ en la KONGRESLIBRO kaj en la KONGRESGAZETO

Pri tiuj reklamoj, oni bonvolu sin turni: por Hispanujo al la sola agento: Societo «ESPERO KATALUNA» Str. Tallers, 81 (Barcelona.)

### PREZOJ:

		1 pago	1/2 pago	1/3 pago	1/4 pago
<i>Kongreslibro</i>		20 Sm.	12 Sm.	7 Sm.	4 Sm.
<i>Kongresgazeto</i>	1 numero	20 »	12 »	7 »	4 »
	2 numeroj	30 »	18 »	10 »	6 »
	3 »	35 »	21 »	12 »	7 »
	4 »	40 »	24 »	14 »	8 »
	5 »	43 »	26 »	16 »	9 »
	6 »	45 »	27 »	17 »	10 »

Reklamfolioj, enmetotaj en la Kongresgazeton (unuoblaj, ne pli grandaj ol la formato de la gazeto, presigita de la reklamanto): 1 numero 12 Sm., 2 n-oj 18 Sm., 3 n-oj 21 Sm., 4 n-oj 24 Sm., 5 n-oj 26 Sm., 6 n-oj 27 Sm.

### KORESPONDANTA FAKO-Kosto de tiuj ĉi anoncoj: po 0'20 frankoj ĉiu linio

Sro. E. Feill, 88, Boulevard Felix Faure — Aubervilliers — Seine — France — Deziras korespondadon kun hispano, hispanlingve kaj franc-lingve.

Sro. Francisko Martí, strato San Joseph, 7 — Vilanova y Geltrú — Catalunya — (Hispanujo) — Deziras korespondadi per il. p. k. kun ĉiulandaj gesamideanoj.

Sro. R. Rottmann — Stendel — Germ. — Schonbeekstr, 15 — Deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun esperantistoj en ĉiuj landoj.

# TUTMONDA ESPERO

Ĉiumonata ilustrita revuo organo de la kataluna esperantistaro

Redakcio kaj Administracio: TALLERS, 81-BARCELONO (Societo «Espero Kataluna»)

4<sup>a</sup> Jaro

Barcelona, Junio-Julio 1911<sup>a</sup>

N-roj 40-41

ENHAVO: Ekskurso al Badalono.—Humoraĵoj.—Gaja kristnaska meditado pri Adamo kaj Esperanto.—Kataluna Esperantista Federacio.—Gazetaro esperantista.—La antikvaj monumentoj de Barcelona.—Subskribo sur la tombo.—Vanel.—Por kune suferi ĝis morto!—Mateno!—Diversaj seligoj.—Bibliografio.—Anoncoj.

## EKSKURSO AL BADALONO



La 28<sup>an</sup> de la lastepasinta Majo okazis belega esperantista ekskurso al proksima industria urbo Badalona, ekskurso kiun, malgraŭ pluva vetero multe malhelpinta partoprenis 300 gesamideanoj: ĝi estis la plej multenombra el ĉiuj la okazigitaj en nia urbo, kaj tial estas laŭdinda la grupo «Barcelona Stelo», kiu bone organizis tian ĉarmaplenan feston, zorgante eĉ pli la plej malgrandaj detaloj.

Per speciala tramveturilo, ornamita per esperantaj flagoj, la ekskursantoj veturis Badalona'n kie ili estis akceptataj de la Urbestro, ĉe la ĉefa Salono de l' Urbdomo: salutante la Badalon'anojn S-ro Grau rimarkigis ĉiujn pri

la graveco de la esperantista movado, ĉe nia lando kaj pri la utileco de Esperanto, kiu disvolviĝas tre rapide, kaj instigis ĉiujn lerni nian lingvon. La Urbestro respondis per helponpromesontaj vortoj, kiujn respondis la vizitantaj per laŭtega «Vivu Badalona!»

Estis vizitata poste la grava fabriko de la ĉiekonata «Anís del Mono», kie ankaŭ oni akceptis bonege la esperantistojn, kiuj restis tre dankaj al la membroj de la firma «Bosch & C.<sup>1a</sup>», pro la ĝentila memoriga donaco kiun ili al ĉiuj faris: ĝi konsistis el boteleto da brando kaj belaj poŝtkartoj anoncantaj la fabrikataĵon. Je la nomo de la barcelonanoj dankis al «S-ro Bosch & C.<sup>1a</sup>», S-ro Gili, kiu esprimis la deziron ke la famo de la «brando de la simio» kresku kaj pligraviĝu senhalte. Ĉe la belaj salonoj de la kazino «Nuevo Apolo», okazis poste propaganda konferenco.

Niaj samideanoj S-ro Campdelacreu, kaj Grau paroladis pri nia afero. La unua defendis la esperantistajn de la atakoj, kiujn malprave oni al ili faras kaj pruvis ke ni nur iras al celo paca kaj frateca: la ĉeestantaro longe lin aplaudis.

S-ro Grau elmontris ke la esperantistoj ne estas revantaj nepraktikaj iluziceloj, sed ke ili estas batalantoj de afero profitdona kiu sin trudas nepre al la indiferenteco de la nesaĝaj homoj, kaj alportos al la homaro plej grandan utilon. Li finis sian paroladon anoncanta konferencon pri Esperanto okazontan baldaŭ kiu kompletigos tiun propagandan feston kiun kronis la varmaj aplaŭdoj kiujn li ricevis.

La esperantista danzo «La Rondo», kiun ludis F-ino Rey, estis dancata poste de granda nombro da paroj, kaj kantinte la Esperon, oni okazigis balon, kiu daŭris longe ĝis kiam oni devis forveturi reen al Barcelono.

Partoprenis en tiu ekskurso geanoj de la jenaj societoj: «Esperanta Frateco», «Aŭroro», «Forigu Barojn», «La Rondo», «Semo», «Esperanto kaj Patrujo», «Universala Frateco», «Kulturo», «Ĉiam Antaŭen», «Racionala Grupo», «Paco kaj Amo», kaj «Barcelona Stelo», kiu ricevis gratulojn pro la bona organizado de tia festo. Ni devas danki, krom la organizinta grupo, la Urbeŝtraron de Badalona, la firmon «Bosch & C.<sup>1a</sup>», kaj la kazinon «Nuevo Apolo», por la helpo kiun malŝpare ili donis al niaj samurbaranoj, kiuj neniel povos forgesi tiun plezurigan feston, kiu espereble estos la semo el kiu naskiĝos, ĉe la proksima bela urbo, Esperantista grupo.

## HUMORAĴOJ

La vicaj individuoj de la Franca Akademio estas kvardek, kaj, preskaŭ ĉiuj ili estas literaturistoj kaj personoj de granda lerteco.

— Tiel, do, — diris unu, strange, — kiel diabloj ankaŭ estas akademiano N... N...?

— Nu, ĉu vi ne vidas que por fari 40 oni bezonas unu nulo?

Ĉiam kiam Gumersindo vidis la pastron de sia edzino, li lin parolis pri ŝi rakontante al li ĉiujn ŝiajn difektojn.

Unu tagon, la bopatro, enuigita por aŭdi ĉiam la samajn plendojn, tiel parolis al sia bofilo:

— Vi estas prava: Mia filino estas kolerema, impertinenta, fiera... kaj se ŝi ne sin korektas mi estas preta ŝin senheredigigi.

De tiu tago Gumersindo ne parolis denove al sia bopatro pri la difektoj de sia edzino.

Ĉe sovaĝaj bestoj:

La dresisto.—Tiu ĉi Behngala tipo kuraĝas manĝi unu bovoviron.

Sinjorino al sia edzo:

— Zorgu Venancio, ne alproksimiĝu tiel!

— Jes mi ĉeestis la predikadon de pastro Nikanoro.

Kiel li parolas! Kvazaŭ anĝelo! Kia parolado!

— Sed, kion li diris?

— Ho amikino mia! Tiujn ĉi aferojn ne estas kompreneblaj de ni.

Oni rakontas ke ludemulo je la loterio aĉetis ĉiam la loteriajn biletojn ĉe la samvendejo, dirante al biletvendisto: «Vi vidus kion mi donacos al vi la tagon en kiu mi gajnos unu, el ĉefaj premioj!»

Tiel pasis kelkaj jaroj, ĝis kiam li gajnis premion de konsiderinda kvanto per unu el numeroj kiujn ludis tiu individuo.

La biletvendisto frotis siajn manojn pro gajeco, pensante pri la donaco ĉo kiun la alia promesis al li kiam vidis la alvenon de la loteria ludisto, kiu kunportis belegan ĉaspafilon enfermitan en ĉaspafilujo el mahagono.

— Tre dankon—diris la biletvendisto akceptante la ĉaspafilon, kvankam mi ne estas ĉasisto...

— Mi ne donacas al vi ĝin por ke vi ĉasu, interrompis la ŝanculo, sed por ke vi pajfigu min kiam mi reeniros tiun ĉi lokon.

Aŭtoro malfeliĉa renkontas en la sekvanta tago en kiu oni ludis teatraĵon sian, amikon al kiu li sendis kelkajn teatrajn biletojn:

— Ĉu vi ankaŭ, fajfis, hieraŭ?

— Ne. Mi pasis la tuta nokto dormante.

Sinjoro renkontis ĉe la strato alian kiu lin haltigis, salutante lin kore.

— Ĉu estas ebla ke vi ne konu min?...

Sed tio ĉi ja ne estas strangaĵo, ĉar jam de dudek kvin jaroj ke ni nin ne revidis. Mi estas tiu kontraŭ kiu vi havis duelon per pistolo, pro politika interdiskutado.

— Ho! Vere. Mi tute jam forgesis tiun okazintaĵon.

— Do, mi ne, ĉar mi suferis tiam, terura timo.

Mi aŭdis pasi preter mi la celdirektitan de vi kuglon kiu fajfis apud mia orelo.

— Mian kuglon? Sed tiuj pistoloj estis ŝargitaj?

— Kompreneble!

— Senhonoraj sekundantoj! Kaj ili certigis al mi ke tiuj pistoloj estis nur ŝargitaj per pulvo! Tial ke mi estis mortigitebla!...

Kaj li falis teren sveninta.

— Diru al mi kio signifas tiu ĉi enskribo: «English spoken here», kiun oni legas sur tiu ĉi vitra meblo.

— Tio ĉi signifas: Tie ĉi oni parolas angle.

— Nu, ni ne eniru en tiu ĉi butikon, do nek unu nek la alia el ni scias paroli tiun ĉi lingvon.

Antaŭ la juĝistaro la tagon 2 Januaro:

La prezidanto.—Kiel alia foje ĉi tie?

La jutgato.—Sinjoro prezidanto. La kaŭzo de tio estas ke mi volis gratuli vin por la nova jaro.

Post jara edzeco:

— Kiel, Lucia, haro inter la supo?

— Sendankulo! Ĉi kiu estis petante al mi ĉiam frizon en aliaj tempoj!

Johano Lanas, eniras butikon en kiu kelkaj fraŭlinoj funkciigas skribmaŝinojn kaj diras:

Ĉu tiuj ĉi skribmaŝinoj ankaŭ metas en la skribaĵojn la ortografion?

*Tradukis, P. Aguiló*

## GAJA KRISTNASKA MEDITADO PRI ADAMO KAJ ESPERANTO

*(Daŭrigo)*

Evo pro timo tremanta revenis jam kaj ne kun sia edzo.

Feliĉa Adamo nun ridis, ridegis pro ĝojo, ke ankaŭ Evo devis ridi, ridegi. Kun ili kantis pro ĝojo ĉiuj birdoj en paradizo.

Sed kompatinda Adamo ankoraŭ ne povis rememorigi, kiel oni dirus per dolĉa homa lingvo: «Evo, Evinjo, amantino mia, mi amas Vin el tuta koro, Vi estas mia arde amata edzino!» Li anstataŭ tiu amplena per siaj elokventaj, enamiĝintaj okuloj kaj Evo ne povinte kompreni, kion li per tio volis diri, nur imitis liajn gestojn kaj ridis, ridegis, ĝis Adamo denove estis ekplorinta.

Fine li ekmemoris ankoraŭ la kelkajn vortojn, de la preĝo: «Dio malfermu miajn lipojn, kaj mia buŝo rakontos Vian gloron». (El Biblio-trad. D-ro. L. L. Zamenhof).

Tial Dio el la ĉielo aŭdinte tion, decidiĝis helpi al paradizaj homoj. Li konsideris, ke li denove devos komenci per instruado de lingvo, kiun Adamo estis jam forgesinta kaj kiun ankoraŭ Evo ne konis.

Li konsideris, ke la homoj necesege bezonas la lingvon ne sole por ludado, sed por reala kaj ĉiutaga vivo. Li tial diris al siaj anĝeloj: «Serĉu la skribojn», kaj alportu en paradizon Fundamenton de la lingvo, kiun vi nomas, «Espero», laŭ kiu Adamo lernis jam preĝi!»

Anĝelo tuj plenumis Diajn ordonojn kaj alportis «Fundamenton» de tiu arta lingvo.

Vi certe estas opinianta, ke tiu «Fundamento» devis esti skribita en grandega libro.

Sed ne mia kara amiko, kiu malamas ĉiujn senfinajn gramatikojn, ne timu. Tiu ĉi libro, kvankam ĝi enhavas instrukcion kun plena vortaro de arta, plejbelsona kaj riĉplena lingvo, tamen estas libro malgrandega.

Dio malfermis tiun libreton kiu en lia plej sankta mano brilis kiel fonto de lumo kaj per kiu li instruis la homojn legi en la libro de la Naturo.

Dia patro, la unua instruisto, montris al siaj lernantoj ĉarmegajn bildojn de multaj ĉielkorpoj kaj milmiloj da steloj. Dio, majesta Monsdinjoro, disvolvis antaŭ ili ĉiujn misterojn de l' vivo de la birdoj, fiŝoj, arboj, ŝtonoj kaj akvoj; ĉiun vivon de siaj plej altaj mondoj kaj per flamaj vortoj klariginte al ili ideon de senlima scienco aŭ religio, li diris: rigardu miajn florojn, eĉ ili havas vivon, ili estas spiritoj, kiuj vivis jam en mondoj de diversaj steloj, kiel vi vivas ĉi tie! ankaŭ ili havas esperon vivi ree laŭ mia volo alian novan vivon. Kredu, kredu la vivon kaj neniam perdu esperon je mia amo. Ĉio, ĉio, mi diras al vi, vivas per mi en sankta harmonio, por kiu harmonio estas necesaj la ordonoj.

Rigardu ĉielajn korpojn kun iliaj planedaj organismoj, kiel ili plenumas miajn ordonojn sciante, se ili ne obeus min, ke tio estus ilia detruo, ilia morto. Ankaŭ bestoj havas ordonojn, ili estas devigataj obei min sole per sia instinkto; sed al vi mi donis prudenton kaj liberan volon, ian parton de mia propra sankta volo. Koncerne tion, ke vi estas tamen nur homoj, mi donos al vi ordonon, ne malfacilan. Rigardu tiun arbon en la mezo de via paradizo. Vi vidas sur ĝi bluan floron, memoru, ke vi devas kredi al mi, vi vidas sur ĝi verdajn foliojn, tio signifas, ke vi povas esperi vivon eternan; vi vidas ruĝan frukton, tio signifas amon, kiu apartenas al mi, se vi amas min, vi ne devas tuŝi ĝin, konservu amon mian.

Tiun ĉi arbon mi nomas arbo de la sciceco. Estu singardema, ke ĝia nigra ombro ne falu sur vin, vi devus morti.

Post tiu konscia preparado de iliaj animoj, la Ĉiopova komencis nobligi la lingvon per instruado de koro koncerne amon, kiu Adamon en la horo tiom premis. Li tiel pritraktis gramatike per parolekzercado la vortojn: amo, ami, amanto amantino, amata, k. t. p. ke Adamo povis baldaŭ surgenue konfesi al Evo sian sinceran amon, li vokis per konvenajn gestojn, Evo, Evinjo, mi amas Vin el tuta koro, Vi estas mia arde amata edzino!

Kaj Evo Adamon bone komprenis, ŝi ne timis lin plu, ŝi jam ridetis, kiam li karesis ŝin per la mano.

Adamo ne sole parolis li eĉ lernis jam skribi, kaj skribis sur ĉiu vojo en sablon kaj en bananfolion per dorno pri sia amo. Li fine ricevis de Dio liron sepkordan kaj lerninte ĝin ludi de keruboj, baldaŭ kantadis kun ĉiuj anĝeloj: «Vekiĝu mia animo, vekiĝu, citro kaj harpo, mi vekos la matenan ĉielruĝon. (El la Biblio.—Laŭ D-ro L. L. Zamenhof.)

Poste Adamo jam verkis eĉ poemojn je sia arde amata edzino, al kiu li ofte aranĝadis serenadojn kun alaŭdoj, najtigaloj kaj aliaj kantbirdoj, kiuj akompanadis lin, kiam li kantis:




«Evo mia belega  
edzineto ĉarmega!  
kun ĝojego mi Vin amas,  
per Vi Dio min ornamas,  
Evo mia belega,  
edzineto ĉarmega!»

Melodio al tiu ĉi kante konserviĝis en antikvaj kantoj de bohema nacio kun similaj vortoj:

Zenuško má predrahá (alparolu: ĵenuško ma prjedrahá) = «edzineto mia altŝatinda», kun sekvanta melodio:

Melod. de A. Jenen



(Daŭrigota)

## KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Dum la 24<sup>a</sup> kaj 25<sup>a</sup> tagoj de Junio okazos la dua Kongreso en Tarragono.

Laŭ niaj sciigoj la Societo Espero Kataluna ne sendos al ĝi oficialan delegiton.

En la venonta numero ni klarigos la kaŭzojn kial tiu societo agis tiamaniere.

## GAZETARO ESPERANTISTA

De «Le Phare Stenographique», 60, Rue des Carmes. Rouen.

RIĈECO (Fabelo). — Benĉjo marŝas sur la vojo kaj ekvidas skatolon, prenas ĝin en la manoj. Peza! eble estas en ĝi riĉeco.

Volas li ĝin malfermi, ne povas: ŝlosita!

Rigardas li ĉi tien, tien, mankas ŝlosilo, kaj en la skatolo, kredeble estas oro, eble ankaŭ perloj kaj diamantoj. Kion fari?

Sen ŝlosilo oni ne povas ĝin malfermi. Iras li antaŭen kaj nur revas kia estus tiu riĉeco.

Subite io ekbrilas antaŭ li.

Kliniĝas li, prenas ĝin — kaj, ĝi estis ŝlosilo malnova.

— Nu mi provu, ekpensas li ĉu ĝi ne konvenos por la skatolo.

Metas li la ŝlosilon en la hoketon de la skatolo, turnas ĝin kaj el interne aŭdigas «ck».

— De ĝi estas! Feliĉon! ekpensas Benĉjo kaj rapide malfermas la kovrilon de la skatolo, la manoj tremas pro ĝojo, la kapo turniĝas, kion do li trovis en la skatolo?

— Jen kio: bovidan voston... Se la vosto estis pli longa ankaŭ la fabelo estus pli longa!

INTER AMIKOJ. — Mi vin tre petas komplezon.

— Kun plezuro mi servos al vi; kion vi deziras?

— Konsilu vi ankaŭ mian filon; mi miras kion fari kun li; de kelka tempo li ne volas aŭdi la konsilojn de saĝa homo, li iras nur laŭ la konsilojn de frenezuloj, de idiotoj, mi vin petas konsilu al li ankaŭ vi.

KONTRAŬAJ KOMPLIMANTOJ. — Unua sinjoro, ekbruligante cigaron kaj tenante antaŭ ĝin la nazo de sia kunvojaĝanto: «Nu, kion vi opinias pri tiu ĉi cigaro?»

— Dua sinjoro: «Ŝajnas al mi, kvazaŭ ĝi odoras kiel ekbruligitaj haroj de porko».

— Unua: Ĉu eble mi tuŝis vian barbon?

\*\*

De Germana Esperantisto Gazeto. — Kaiser Friedrichstrasse, 1. Magdeburg. Alemania.

## GRANDEGA FLATAĴO

Filo: Paĉjo, vi havas aspekton kiel leono!

Patro: Kion vi diras? Sed vi ja neniam vidis leonon!

Filo: Ho, jes! En la muelejo mi vidis ĝin.

Patro: Malsaĝuleto, tiu do estas azeno!


Filo: Jes, jes! Pri tiu mi volis paroli.

F. O. FUNKE, Neuhausen

## EN LA BANEJO

Ian tagon patro kaj filo iris bani. Post mallonga tempo la patro demandis sian fileton kaj diris: «Ĉu vi jam subakvigis vian kapon en la akvon?» «Kio?», nur respondis la knabo. «Ĉu vi jam subakvigis vian kapon en la akvon?», diris la patro pli laŭte? «Kio?» denove estis la respondo. «Ĉu vi jam subakvigis vian dikan, malpuran, fulmotrafitan brasikokapon en la akvon?» kriegis nun la koleranta patro. «Jes, patro, jes, jes», tre gaje eksotis la respondo.

P. GÜNZEL, Bremen.



Facado de la preĝejo de «Betlèm».

## LA ANTIKVAJ MONUMENTOJ DE BARCELONO

(Daŭrigo)

La Palaco de la Provinca Deputataro datumas de la XVI<sup>a</sup> jarcento, kaj ĝi estas de Renesanca stilo. Majesta, linidelikata kaj tiel harmonia konstruaĵo ĝi estas, ke ĝi honorigas la arĥitekturiston kiu ĝin projektis. Estas tie rimarkindaj, krom la facado:

la vestiblo, la ĉefa ŝtuparo kaj la vasta salono de «Sta. Georgo», vera mirindaĵo.

Estas ankaŭ vidinda pro sia Renesanca stilo, la Resaniĝantejo ĉe la Hospitalo de la Sta. Kruco, pro sia klostro kaj pro la interesa blukolora briketaro kiu ornamas ĝiajn murojn.

Fine, la barokan stilon oni trovas kiel eble plej belan, en la preĝejo «Betlèm».

Ĝia facado kaj la pordo nomata de la «Dia Infano», apud la Ramblo, estas modeloj de la baroka arto. En ĝia internaĵo,



Stukaĵoj de la domo «Pella».

la multkoloraj ŝtonoj kaj marmorajoj, la fostoj, trodikuloj kaj orumitaĵoj, formas la diversan ornamadon propra de tiu arto, kiun disvastigis tra Hispanlando la P. P. Moŝtoj de la «Jesua Kolegaro».

Multenombraj preĝejoj kaj apartaj domoj suferis dum la tempo de sia konstruado, la influon de la baroka arto, kiun oni povas vidi sur kornisoj, figuroj, frontonoj kaj desegnaĵoj. Inter tiuj konstruaĵoj estas citindaj, la «Lernejo de la Ĉefa Arto pri la Silko», kaj la «Domo Pella», sur la strato «Sant Pere més Alt».

La ŝtuparo de la palaco apartenanta al la familio Dalmases, estas rimarkinda pro sia baroka stilo, unu el la plej delikataj.

Poste, ĝis la nuna epoko, malmultaj konstruaĵoj meritas ja esti citataj.

FINO

## SUBSKRIBO SUR LA TOMBO

Se vi estas modesta, vi pri mi ekpregŭ...  
 Se vi enfalis funden de la senbrideco,  
 Ne malhonoru tombojn per via logeco...  
 Vi inter adorantoj festenu kaj reĝul...  
 Ho vi bela virino portanta faireron  
 De l' nesingarda amo en nesperta koro  
 Haltiĝu iome... pripensu pri gloro  
 De tiuj ĉi restaĵoj... konu tutan veron!  
 Ho, iam ankaŭ estis mi juna kaj bela;  
 En mia koro brulis juneca pasio,  
 Dume mi fidis Dion estis tempo hela....  
 Kaj ĝuol ĝi forgesis kiel iluzio...  
 Post ĝi sekvis doloro kaj sorto kruela...  
 Min evitis la homoj kaj ne benis Dio!

## VANE!

Vane vi min allogas, vane via ĉarmo  
 Brilas tiel favore... Malestas fajrejo!...  
 Ĝi tute estingiĝis... nur restis cindrejo —  
 Frostigita statuo el plej brula larmo.  
 Ho brulis iam flamol! Kia estis varmo!  
 Ho ve! flirtema knabo, vi forĵetis ĉion!  
 Vi rec serĉas ĝuon, plezuron, orgion...  
 Ho, vane, ĉar nur restis glacia malvarmo!  
 Vi atendas miraklon!... Plendinda laboro!  
 Ĉu ekblovos vi fajron per via kratero?  
 Ĉu vi amon inspiros en rompita koro?  
 Ĝi super viaj fortoj!... Kaj kia neceso!  
 Vi ĉie trovis ĝuon sonante per oro!...  
 Por mi restas maldolĉo penso kaj forgeso...

## POR KUNE SUFERI ĜIS MORTO!

Ho se vidus mian ekvunditan koron,  
 Ho se vi scius iom pri mia sufero  
 Pri la nekonsebla mia malespero,  
 Ho, vi al mi havigus almenaŭ favoron!  
 Ĉu vi scii ne volas, ĉu vi ne komprenas...  
 Vi amuzas vin, ĉiam, dirlotas bone,  
 Vi ridetanta ĉiam vin kantas fanfarone.  
 Ho, vi kun adorantoj ĝuas kaj festenas!...  
 Sed sciu nesingarda, ke viaj amantoj  
 Neniam serĉas amon, sed per loga vorto  
 Ili ĝuojn deziras de l' amo mokantoj  
 Ho vel... gardu vin Dio de misera sorto...  
 Kaj se tio okazus... kuru de l' trudantoj  
 Venu al mi... por kune suferi ĝis morto!

## MATENO

Tra densegajn nebulojn varmaj sunradioj  
 Freŝiĝas fervore sur dormantan teron  
 Brilante lumigas la ĉiun roseron,  
 Vekiĝas ĉiu floro kaj arbaj folioj,  
 Jen aŭdiĝas la birdaj pepadoj matenaj  
 Rava naturvidaĵo, ĉio reridetas.  
 Sonas voĉoj paŝtistaj... kaskado bruadas  
 Melodie fluante per ondoj ŝaumplenaj...  
 Ho vi fine vekigu dormanta homaro,  
 Lumiĝu per radioj de Dia Spirito,  
 Deĵetu mallumaĵojn!... Vekiĝu frataro!  
 Suno de l' Sankta Lumo estu la sendito  
 Kaj certa por vi Savo... for antaŭjuĝmaro!  
 Ĉiu laŭte ekkriu... mi estas savito!

Karso

ANTONO WIECZORKIEWICZ

\*\*

Ĉiuvespere, sinjoro, antaŭ ol enlitiĝi, ordonis al sia servisto ke, la morgaŭan tagon, li veku lin je la oka akurate.

Iun vesperon la sinjoro forgesis ordoni tion al li kaj la servisto ankaŭ forgesis demandi ĝin.

En la morgaŭa tago, je la kutima horo, la servisto ne sciis, ĉu veki, ĉu ne veki lin.

Fine li decidis forigi siajn dubojn kaj enirante en la dormoĉambron de la sinjoro ekdiris laŭte:

— Ĵ Sinjoro!... Ĵ Sinjoro!... Ĉu mi ankaŭ hodiaŭ devas veki vin?

## DIVERSAJ SCIIGOJ

**Ekskurso al Cervelló.**—Okaze la fondiĝo de la tiea grupo «Verda Stelo», kelkaj anoj de Espero Kataluna aranĝis ekskurson kiu okazis la 2<sup>an</sup> de Aprilo.

En la stacidomo ni trovis samideanojn de Sabadell, kaj Santa Perpetua, kiuj ankaŭ iras al Cervelló. La vagonon en kiu ni vojaĝis ne sufiĉis por tiom da samideanoj. Post gaja veturado ni alvenis en Molins de Rey, kie atendis nin komiso de V. S.; ni supreniris en grandaj specialaj veturiloj, nomataj «tartanoj» kaj post unu horo ni atingis Cervelló. La anoj de V. S., kaj la tuta najbararo kore salutis nin kaj tuj ni iris al la vitra fabriko «Can Mensa», kie kelkaj esperantistaj laboristoj faris antaŭ ni belajn vitraĵojn kaj poste la mastro akompanis nin tra ĉiuj ĉambroj de tiu grava fabriko. Je la 12<sup>a</sup> kaj duono ni iris al la sidejo de V. S., kie belaj fraŭlinoj servis malvaran festenon en kiu partoprenis pli ol 60 kunmanĝantoj. Tostis sinjoro Mestres, Camderros je nomo de V. S., Urbez, de «Espero Kataluna», Casanellas, de Cervelló; Jordi, de Santa Perpetua; Torruella, de Sabadell; kaj fraŭlino Bosch, profesorino de la vilaĝlernejo. Ĉiuj atingis multajn kaj ĵustajn aplaŭdojn pro siaj bonaj paroladoj.

Oni faris kelkajn fotografiaĵojn kaj ni iris al la Ateneo la plej granda societo el Cervelló.

Kiam ni eniris la granda salono estis tutplena; ĉiuj la Cervelanoj ĉeestis en la festo inter ili la vilaĝestro, juĝisto, vilaĝkonsilantoj multaj kaj tie belaj fraŭlinoj k. t. p. resume 900 ĉeestintoj el 1,000 anoj kiuj loĝas en Cervelló.

Deklamis katalajn poeziojn kaj poste tradukitaj esperante fraŭletoj Thirion, Riba, Sala, Flo, Sabat, Bassons, Milá, kaj fraŭloj Font, Torruella. Fino Bosch, tre sprite, verkis por tiu festo katalunan propagandan komedion kiu estis ludita de fraŭlinoj Urpina, Manné, Bassons, Roca, Nicolau, Casanellas, kiuj atingis multajn aplaŭdojn tial ke fraŭlino Bosch, estis devigata saluti dufojn la publikon de la scenejo S-ro Urbez de «Espero Kataluna», por montri al la ĉeestantaro io el nia literaturo ludis scenon de «Efigenio en Taŭrido», pro kio estis varmege aplaŭdita. Faris paroladojn pri Esperanto kaj ĝi utile S-rojn Camderros, Bassons, Rovira, de «Katolika Stelo» (Sabadell); Mestres Aplecano (Sabadell); Fló, Casanellas, Torruella. La publiko premis per grandaj kaj senĉesaj aplaŭdadoj la laboron de la gepartoprenintoj. Fino Bosch, dankis al ĉiuj pro ilia helpo al tiu neforgebla festo kaj per lerta parolado klarigis sian entuziasmon por nia ideo incitante ĉiujn por ke ili lernu Esperanto. S-ro Sekretario de Ateneo, je nomo de ĝia komitato dankis ĉiujn pro la belega festo ĵus okazinta. Ni eliris de la societo je la 6<sup>a</sup> kaj post viziti la preĝejon kies pastro tre afable ĝin montris al ni, ni adiaŭis niajn amikojn kaj revenis al Barcelono dezirante ofte tielajn ekskursojn.

J. LLORACH

\*\*

**Novan vojon.**—En tiu Grupo de la laborista «Kvartalo Barceloneto», okazis la 25<sup>an</sup> de Majo esperantista festo, por solenigi la malfermon de esperantaj kursoj.

Kelkaj geanoj de la grupo legis poeziojn ĉu esperante ĉu Katalune. Sinjoro Grau, per lerta parolado pruvis al la ĝeĉeestantoj la bezonon kaj utilon de nia lingvo.

\*\*

**7<sup>a</sup> Internacia Kongreso de Esperanto.**—Antverpeno, 20-27 aŭg. 1911. — Literaturaj Konkursoj. — Aldono al la cirkulero de la 31<sup>a</sup> de Marto.

10. S-ro John P. Nix, Eastbourne, Anglujo.—*Soneto*, temo laŭvola. Premio: 12.50=Sm. 5.

11. *La Revuo*, internacia gazeto, Hachette & K-io, 79 Boulv. St. Germain, Paris *Originala studo pri historio, literaturo aŭ arto*. Maksimume 25 presitaj paĝoj de la *Revuo*. 1<sup>a</sup> premio: fr. 100=Sm. 40; 2<sup>a</sup> premio: 50 fr.=Sm. 20.

12. «Fervoro», esperantista grupo, Antverpen. —*Kvarversaĵo*, temo laŭvola. Premio: fr. 50=Sm. 10.

13. «Ĉekbanko Esperantista», Merton Albey, London, S. W. — *La plej taŭga, konciza klarigo de la esencoj de ĉekoj kaj transpagiloj kaj ilia tasko kaj utilo en la komerca pagado*, facile komprenebla al tute nesperta kontulo tiamaniere ke li sen plua instruo nepre ekvidas iliajn utilojn kaj praktiken ili povas uzi. Premio: Konto malfermita ĉe la «Ĉekbanko», kun kredita saldo de fr. 62.50=Sm. 25.

14. *Juneco*, revuo esperantista de la junularo, Paris.—*Rakonto, novelo, versaĵo*, pri iu ajn temo, verkita de persono, malpli ol 20 jara. Premio: bela arta objekto.

15. F-ino Maria Moreau, Bruxelles.—*Rolo de la virinoj en la esperantista movado, taŭgaj rimedoj por enkonduki Esperanton en la internaciajn virinajn instituciojn*. Premio: fr. 50=Sm. 12.

16. «Stela-Concert», Parizo.—*Kanzono kaj kompreneble laŭ populara ario*. Premio: Bela arta objekto.

17. Redakcio de *Germana Esperantisto*, Berlino. — *Pri skribo de popoloj moroj aŭ laŭ elekta: Popoloj legendoj*.—Proksimume 1,000 vortoj en unu aŭ pluraj artikoloj. 2 premioj konsistantaj el libroj. Valoro de ĉiu premio: 18 Sm.

La manuskriptoj devas esti senditaj al la sekretario-kasisto antaŭ la 15<sup>a</sup> (ne la 1<sup>a</sup>) de Julio.

18. «Societo Esperantista Kaukaza». Tiflis. — *Originata aŭ tradukita 5-8-paĝa, verko pri iu ajn temo*, kun ekskluziva uzo de radikoj, entenataj en *Universala Vortaro*, de la Fundamento. 1<sup>a</sup> Premio: 12 Sm.; 2<sup>a</sup> premio: 8 Sm.

#### EKSPozICIO

La loka komitato de la «Sepa» organizos ekspozicio. Por ĝin sukcesigi ĝi faras alvokon al ĉiuj eldonistoj, aŭtoroj grupoj kaj ĉiuj samideanoj por la alsendo de libroj, broŝuroj, kantoj, cirkuleroj, fotografaĵoj, afiŝoj, ĉiuspecaj dokumentoj k. t. p. Ĉio estos zorge konservata, kaj tuj resendata post la 1<sup>a</sup> de Septembro. De la 1<sup>a</sup> de Aŭgusto la sendaĵoj estos akceptataj. Adreso: Sepa Internacia Kongreso de Esperanto. Koninklyk Athenekum, Antwerpen (Athénée Royal, Anvers).

**Okcident-Siberia Ekspozicio.**—Dum la somero de la nuna jaro en urbo Omsk estos organizita la unua agrikultura-industria Okcident-Siberia ekspozicio. Tiun ekspozicion kunvenos multaj homoj el malproksimaj anguloj de Siberio kaj Rusujo, Tre grave estas, ke Esperanto estu plej bone reprezentita en tiu ekspozicio, por ke la kunvenintoj disportu la semojn de esperantismo tra la tuta lando. Tiel *Tomska studenta rondeto* decidis preni sur sin la organizadon de esperanta-fako en la ekspozicio kaj esperas ke la tuta esperantistaro, unuanime helpos en tiu entrepreno per alsendo de gazetoj, libroj, ilustritaj poŝtkartoj kaj ceteraj esperantaĵoj al S-ro A. Skalskij, Atmauskaja 6. dom. Levina. *Omsk, Siberio*.

**Cu Esperanto, ŝu Ido.**—Profesoro Ostwald petis en la lasta numero de *Zeitschrift für Physikalische chemie*, ke la legantoj de tiu ĵurnalo esprimu siajn opiniojn pri la dezirindeco eldoni resumojn de ĉiu artikolo tie publikigita,

ne nur germane, sed ankaŭ *internacilingve*. Profesoro Ostwald tie proponas ke en okazo de jesa voĉdono *Ido* estu uzata, kvazaŭ tute ignorante la pli grandan taŭgecon de *Esperanto* por tia uzado.

Pro tio, kara leganto, ni petas al vi tuj skribu al Profesoro Ostwald, sendu vian voĉdonon favore al Esperanto, kaj petegu ke li uzu Esperanton en sia ĵurnalo.

Jen la adreso: Profesoro Ostwald, ĉefredaktoro de la *Zeitschrift für Physikalische chemie*, Gros Bothen, Sachen, Germanujo.

**Bona sciigo.**—La 29<sup>an</sup> de la pasinta Aprilo okazis la ekzamenoj de la lernantoj de la Milita Supera Lernejo. La rezultato estis brilantega. Post iaj-ajn gramatikaj demandoj, la profesoro Staba Subkolonelo Ayza diktis Esperante al ĉiu lernanto por skribi sur la nigra tabulo paragrafon eltiritan el ĵurnalo kaj ili tre bone tradukis hispane, sen la pero de la vortaro; tio plaĉis multege al la profesoroj de la tribunalo. Eble oni proponos al la Milita Ministro la iradon en la Antverpeno, por ĉeesti al la Sepa Kongreso, de tri lernantoficiroj prizidotaj de ilia profesoro antaŭe nomita.

**Alia.**—Per Reĝa Dekreto publikegita sur la Oficiala Madrida *Gazeto* en la numero de la 5<sup>a</sup> de la Maja monato oni donas la bazojn por la Hidrologia klimatologia kaj geologia Kongreso okazonta en Madrid (Hispanujo), je la 15<sup>a</sup> ĝis la 22<sup>a</sup> de Oktobro de 1912.

La 11<sup>a</sup> bazo kiu interesas la esperantistoj estas la jena.

La verkoj pritaktotaj en la Kongreso povos esti verkitaj latine, germane, angle, franca, itale, portugale, *esperante* kaj hispane.

**Kondolenco.**—La patrio de la fervorega Esperantisto S-ro Alfonso Sabadell mortis en tiu ĉi urbo dum la tago 18<sup>an</sup> de la estinta Maja monato.

Ni partoprenas la kompreneblan doloron kiu kaptis nian distingindan amikon, dezirante pacan ripozon al la mortintino kaj al li la sufiĉan kristanan rezignacion tiel bezona en tiuj malfeliĉaj okazoj.

**Dua Kongreso Internacia de Katolikaj Esperantistoj.**—Ĝi okazos en la Hago (S. Gravenhage) Nederlando de la 14<sup>a</sup> ĝis la 19<sup>a</sup> Aŭgusto venonta. La kongreskomitato ekkomencis sian laboron por ke la Kongreso estu brilega sukceso por nia helplingvo internacia, fortika pruvo de ĉiam floranta, vigla, katolika vivado, grava paŝo antaŭen al la atingo de l' sankta celo de la Eklezio; «Paco sur tero al ĉiuj homoj de bona volo».

Prezo de la kongreskarto: 2.10 Sm. Belegaj afiŝoj po 0.45. Kongresmarkoj; 100 por 0.45 Sm. Mendoj al iu el kasistinoj fraŭlino Math. Borret, Paris-Hendrikstr. 21, aŭ S-ino Whitney, Weimastraat, 251, 'S Gramehage.

**Naskiĝo.**—Nia malnova samideano S-ro Savinto Casanovas patriĝis unuafoje la 16<sup>an</sup> de Aprilo estinta.

Karesan kiseton al infano Amadeĵo kaj la plej sincervarman gratulon al tre estimata amiko kaj respektinda ezidino.

**Kataluna Katoliko.**—Ĉiumonata organo de la Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj. Redakcio kaj Administracio ĉe Librejo Rosals. Strato Portaferrisa, 30, Barcelono. Hispanujo.

Ni ricevis la agrablan viziton de tiu nova kunfrato, kiu pligrandigante la vicojn de la Esperantistaj disvastigantoj en nia patrujo, celas starigi Ligon de Katalunaj Katolikaj Esperantistoj.

Dankante ĝian afablan saluton, al kiu plezurege ni korespondas, ni ĝojos pri longa vivado kaj granda sukceso de l' frata kolego.



## BIBLIOGRAFIO

**KELKAJ VORTOJ PRI TEOSOFIO.** — Parolado farita la 11<sup>an</sup> de Aprilo 1911 ĉe la Esperantistaj Mondumaj Kuvencoj en Parizo de S-ino Dion-Tronillon. Prezo: Fr. 0'25 (Sm. 0'10). Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

«Teosofio estas senlima, ĝi entenas ĉion, ĉar ĝi estas la Dia saĝeco, kaj nenio povas ekzisti ekstere de tiu saĝeco. Teosofio ne estas aparta religio, ĉar ĝi ne altrudas kredon, ĝi forigas, forpelas el si neniun. Teosofio estas neŭtrala, paca, ama grundo, sur kiu ĉiuj povas apudesti, ĉar ĝi estas sintezo de ĉiuj religioj, filozofioj, scienkaj sistemoj, absolute kiel Esperanto estas sintezo de diversaj lingvoj, kunigante ĉiujn alilingvulojn: Teosofio estas do la Esperanto de ĉiuj opinioj; ni povas kuniĝi en ĝi, laborante por la ĝenerala bono, farante la senesceptan, grandegan rondon familian, kun mano en mano, koro ĉe koro, altigante ĉielen le okulojn, la spiritojn kaj la korojn.

\*\*

**EL IDIOMA INTERNACIONAL AUXILIAR ESPERANTO AL ALCANCE DE TODOS.**—Hispana Gramatiko pri Esperanto. De S-ro Fernando Soler Valls. Dua eldono. Prezo: Du pesetojn (0'80 Sm.). Presejo de sinjoro Jaime Martinez-Enguera. Valencia (Espana).

Tre utila verko por tiuj, kiuj ne scias gramatikon aŭ ĝin forĝesis kaj deziras lerni Esperanton.

S-ro Ayza, aŭtoro de la antaŭparolo de tiu gramatiko, diris pri ĝi: «Mi finas per du gratulojn: unu al la aŭtoro pro sia feliĉa inspiro kaj la alia al la publiko, kiu trovas en ĝi novan ilon por lerni la internacian helpan lingvon.

Mi imitas S-ron Ayza.

\*\*

**GVIDLIBRO DE L' URBO RAVENNA**—Donaco al la membroj de la IV<sup>a</sup> Internacia Kongreso de Filozofio (Bologna, 6 an. 11<sup>a</sup> an. Aprilo 1911) de la Komunumo de Ravenna, de l' Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj de la Universala Esperanto-Asocio.

La fotografaĵoj estas de firmo: Fotografia dell' Emilia Suce. Poppi, Bologna. La klisaĵoj de Tassini e Corsanico, Bologna. La plano de l' urbo estas eltirita el tiu de T. Misericocchi kaj A. Brandolini. La aŭtoro D-ro A. Tellini. Esp. Konsulo en Bologna.

Prezo: 0'40 Sm. Esperanto-Oficejo, Vallescura, 11, Bologna, Italujo.

\*\*

**KOMERCA KORESPONDO.**—Kunmetis J. Borel. **KONSILOJ PRI HIGIENO** de R. Stolle. Tradukis J. Borel. Kajeroj 16<sup>a</sup> kaj 17<sup>a</sup> de Esperanta Biblioteko Internacia. Prezo: 0'100 Sm. po ĉiu. Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin

Pri «Komerca Korespondo», S-ro Borel diras:

«La celo de la frazaro, kiun mi nun publikigas, estas precize faciligi la studon de la Komerca skribmaniero metante sub la okulon ĉiujn frazojn plej oftajn de la negoca korespondo. Oni jam eldonis en Esperanto amason da libroj kun pure literatura enhavo; tio estas bona, sed la nombro de la praktikaj, necesaj verkoj, ne estas proporcie egala. Ni ne forgesu, ke la celo de nia lingvo estas antaŭ ĉio praktika, kaj ke ju pli ni klopodos por la enkonduko de Esperanto en la negocajn interrilatojn, des pli efike ni laboros por la progresado de nia ideo».

En la 2<sup>a</sup> paĝo de «Konsiloj pri Higieno» oni legas:

«Averto. Tiu ĉi libreto enhavas kelkajn praktikajn konsilojn por flegado de malsanuloj kaj kuracado de diversaj plej oftaj malsanoj. Tiuj ĉi konsiloj estas la rezultato de l' eksperimentoj de multaj spertuloj, ili montros en diversaj okazojn la vojon al resaniĝo kaj en malfacilaj malsanoj utilos ĝis alveno de l' kuracisto. Plie, ĝi instruos kiel oni devas konduki dum sanecaj tagoj por eviti malsaniĝon, kaj kiel oni povas dum malsaneco efike helpi la naturajn kuracfortojn kaj subteni la kuracistan agadon».

Kiel mi diris en nia n.<sup>o</sup> 25<sup>a</sup> de Januaro 1910 mi ripetas hodiaŭ plezurege, rilate al la 17<sup>a</sup> gisnunaj aperintaj volumoj de Esperanta Biblioteko Internacia.

*Esperantista devigo, laŭ mia opinio, estas ilin posedi.*

\*\*

**10-SPESEDEKA BIBLIOTEKO ESPERANTISTA.** Kiel jam la titolo montras, ĉi-tiu entrepreno celas liveri al la tutmonda Esperantistaro per tute malkara prezo libretojn pri ĉiuj interesaj temoj. Per sia *plaĉa eksteraĵo, bona papero kaj facilkomprenebla enhavo* ĝi estas vera «Popola Biblioteko de la Esperantistaro», kies kajeroj cetero bonege taŭgas por ekzerca legado dum kursoj kaj grupaj kunvenoj.

Jam aperis: *N-ro 1<sup>a</sup>. Parolado de D-ro L. L. Zamenhof dum la malfermo de la Universala Kongreso en Washington.*

*N-ro 2<sup>o</sup>. Propraj nomoj en Esperanto.* Originale verkita de Prof. P. Christaller.

*N-ro 3<sup>a</sup>. Libro de kantoj* de Heinrich Heine. Serio de la plej belaj poemoj esperantigitaj de la Majstro kaj aliaj famaj Esperantistoj.

Ĉiu numero de tiu Biblioteko kostas 10 Sd.

Abono al 10 sinsekvaj numeroj, afrankite sendotaj tuj post apero Sm. 1.

Prezo al grupoj: 11 ekz. Sm. 1; 23 ekz. Sm. 2; 35 ekz. Sm. 3. — afrankite.

Esperanto-Propaganda Instituto, Djrektor, S-ro Karlo Steier, Kaiser Wilhelm S.tr. 15c.; Leipzig; Germanujo.

\*\*

**AUSBURG.**—(Bavarujo). Gvidlibro eldonita okaze de la Esperanto-Kongreso Ausburgo 1910 de la tiea Esperanta Grupo. Prezo: 0'20 Smj. Reĝa Kortega Presejo Fratoj Reichel, Augsburg (Bavarujo).

Ĝi enhavas krom rimarkinda artikolo de Dr. jur. E. Büttner, Sindiko de la komerca ĉambro de Ausburgo, pri la industrio de tiu grava urbo, interesajn sciigojn pri ĝia konstruaĵoj; kune kun la urba plano kaj belegajn fotografaĵojn.

Profitinda okazo por bonege elspezi du respondkuponojn!

\*\*

**ESPERANTISTA GVILLIBRO EN ROUEN.**—Prezo: 0'25 Sm. (0. fr. 60)

41, Rue de la Vicomté, Rouen. Eldonita de «Normanda Stelo» por Verd-steluloj. Per tiu verketo oni povas promeni tra la nomita urbo kiel vera Rouenano. Ĝi ne pretendas priskribi ĉion kion vi povos admiri, ĝi lasas al vi la plezuron de la eltrovo de ĉarmaj detaloj; ĝi nur kondukas vin tra la stratoj al ĉiuj lokoj kien vi povos esti feliĉaj iri, ŝparante kiel eble plej viajn paŝojn. En lasta paĝo oni legas: «Por montri vian simpatian al samideanoj sendu 2 frankojn por aboni *Normanda Stelo*, rue de la Vicomté».

\*\*

**ESPERANTA GVIDLIBRO TRA BOSNIO HERCEGOVINO.** — Eldonita de «La Stelo Bosnia», Asocio de la Bosnia-Hercegovina Esperantistaro en Sarajevo. Prezo : 40 helleroj ≡ 2 internaciaj respondkuponoj.

Tridek belegaj bildoj kaj interesaj sciigoj konigas la landojn Bosnion kaj Hercegovinon, kiuj antaŭ kelkaj jaroj estis ankoraŭ malmulte konataj ĉar ekzistis nek landvojoj nek vojetoj kaj la fremdulo estis pro siaj havoj kaj vivo minacata. Sed nun la vojaĝo estas absolute certa kaj sur la ĉefaj linioj jam je tiu komforto provizita, kiun ekŝatos eĉ la dorlotita vojaĝanto Eŭropa. Sur la flankaj linioj oni ja ektrovos simplan sed kontentigan restojon kaj flegadon. Ĉie regas plena sendanĝereco kaj eĉ en la regionoj, kiuj antaŭe estis plej malbonfamaj, ĉiu povas hodiaŭ, senarmite, senakompane vagadi la plej dezertajn vojojn.

\*\*

**FUNDAMENTAJ PRINCIPOJ DE LA VORTARO ESPERANTA.** — Antaŭ parolo al plena Vortaro Esperanto Esperanta. E. Boirac. Rektoro de la Dijona Akademio kaj de la Lingva Komitato. Prezo : Fr. 0'50. Libraire Hachette et C.<sup>ie</sup> 79, Boulevard Saint-Germain. Paris.

Parolas pri la danĝero enkonduki en la naciesperantaj Vortarojn novajn radikojn tute ne kompreneblaj por Esperantistoj ne poliglotaĵoj, ĉar ili estas ĉu pure francaj, ĉu pure rusaj vortoj k. t. p. kun esperanta finiĝo. Se ĉiuj vortaristoj agus same en ĉiuj landoj de la tergoblo, baldaŭ ni havos, krom la komuna internacia Esperanto, staranta sur la fundamento de *Universala Vortaro*, tiom da diversaj naciaj Esperantetoj kiom estas da naciesperantaj Vortaroj. Por eviti tiun bedaŭrindan diversecon, la eminenta Rektoro kaj indega Prezidanto de la Lingva Komitato donas tiel praktikajn konsilojn kiel tre klarajn klarigojn, kiuj ne povas esti ignoritaj de la estontaj aŭtoroj de Komunaj, Teknikaj, Vortaroj aŭ Terminaroj, Gazetistoj kaj Kritikistoj.

\*\*

**INTERNACIA LIBROTREZORO. SABLEROJ.** — De S-ino Marie Hankel. Kun portreto de la aŭtorino. Prezo : 0'30 Sm. Germana Esperanto-Librejo. Leipzig.

Kiu ne aĉetos per tiu malalta prezo verkon kun 23 poeziojn en sia Unua parto kaj 25 prozajn artikolojn en la Dua?

S-ino Hankel estas ja tro famkonata por ke mi, sensignifulo, kuraĝu ion diri pri ŝi. Mi min klinas respektige antaŭ ŝia talento kaj certigas ke de la unua paĝo de la nomita verko ĝis la lasta mi ĝuis nepriskribeble.

MIKAELO CASES

La juĝisto. — Kulpigitino, ĉu vi aŭdas tion, kion diras sinjorino Mario? Ŝi diras, ke vi ŝtelis ŝian porkon.

— Estas vere, sinjoro, mi ĝin forprenis, mortigis kaj manĝis.

— Kaj vi ne havas koncienciproĉon? Kiam alvenos la Finajuĝo kaj vi retrovos, rekte al via vizaĝo, sinjorinon Marion kaj ŝian porkon, kion vi diros?

— Sed ĉu via Moŝto kredas ke la porko, ankaŭ, estos tie?

— Sen ia ajn dubo.

— Do, bone; tiam mi diros «Sinjorino Mario, bonvolu pardoni min, kaj jen via porko; reprenu ĝin.»

(De Unu fojon...)

# Sarado-Mozaiko

Laŭ horizontalaj kaj vertikalaj direktoj estas povoble legi la jenon:

1 <sup>a</sup>	2 <sup>a</sup>	3 <sup>a</sup>	4 <sup>a</sup>
2 <sup>a</sup>	3 <sup>a</sup>	4 <sup>a</sup>	
3 <sup>a</sup>	4 <sup>a</sup>		
4 <sup>a</sup>			

Speciala literatura verko

Loko de ago, de fenomeno

Supera estaĵo

Litĉero

Novejarque

## ESPERANTO | GERMANA ESPERANTISTO

### ★ RESTORACIO ★

Strato Asalto, 54 - BARCELONO

Biero, vinoj, ĉampano, kaj ĉiuspecaj likvoroj, Esperanta manĝaĵo ĉiusemajne.

Esperantistoj! Veni tian-ĉi!

ONI PAROLAS ESPERANTE

## GERMANA ESPERANTISTO

Monata gazeto por la vestigado de la lingvo Esperanto  
Monatsschrift für die Verbreitung der Es. ermsprache

Tiu ĉi gazeto, unu el la plej malnovaj esperantaj ĵurnaloj, estas redaktata esperante kaj germane, kun ĉiam varilata enhavo: Originalaj aŭ tradukitaj artikoloj pri ĉiuj temoj, propagando, kroniko, literaturo, bibliografio, korespondado, konkursoj, konsiloj por la praktika vivo, instruoj por lernantoj, oficialaj informoj ktp.


Jara abonprezo 3 M. (3.50 Sm.) en duj landoj.  
Prova abono por 6 monatoj 1.50 M. (0.75 Sm.)

Esperanto Verlag Müller &amp; Bavel, Berlin SW. 68, Lindenstr. 18-19

LUEBLA

## MANUFAKTURO DE KOMERCAĴOJ POR VOJAGI

ONI VENDAS MALALTPREZE



# Manuelo Ballespí

Strato Ample, 43 - BARCELONA